

STARTO

N-ro 1/2023 (286)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto J. Štěpán

Pavel Polnický, honora membro de ĈEA,
ricevis medalon de la urbo Poděbrady

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IĈ): 00 44 30 34

Starto retroŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 1160 Kč, 700 Kč (rete), 400 Kč (rete por ĈEA-anoj); Marĉek: 1360 Kč, 900 Kč (rete), 600 Kč (rete por ĈEA-anoj), Cink por progresintoj 1920 Kč, 1000 Kč (rete), 700 Kč rete por ĈEA-anoj). Aliĝoj: kurzy@esperanto.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:
sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al:
muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Výbor ĈES:

Předseda: Mgr. Ing. Jiří Tomeček, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz; (koordinace a reprezentace ĈES, muzeum Svitavy)

Místopředseda: Mgr. Libuše Hýblová, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (vnější vztahy, UEA, EEU)

Pokladník: Mgr. Andrea Švubová, svubova@esperanto.cz (evidence a aktualizace členské základny, účetnictví svazu a správa majetku ĈES)

Člen výboru: Leonarda Chaloupková, leonarda.chaloupkova@esperanto.cz (kluby a sekce, konference, granty)

Člen výboru: Josef Kalčík, kalcik@esperanto.cz (spolupráce s mládeží, web)

Redaktor Starta: Miroslav Malovec, miroslav.malovec@esperanto.cz (jazyk a historie hnutí, kultura, odborné aplikace, pedagogika) fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878,
252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201,
chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admi-
stras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy,
muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

Novjara Mesaĝo de la Prezidanto de UEA

Duncan Charters

Antaŭ unu jaro, mi detalis iom amplekse la atingojn de la jaro 2021, kaj ankaŭ la defiojn kiujn frontis nia Asocio. La spertoj de la jaro 2022 validigis la mesaĝon, kaj ni progresis kaj plue progresos laŭ la vojoj indikitaj. Dum la jaro, mi daŭre komunikis al vi en nia revuo cele al difino de nia strategia planado, kaj en la novembra numero mi plikonkretigis la elementojn, kiuj gravos por nia laboro.

Printempe ni kune ellaboros dokumenton por la trijara periodo de la nuna



mandato de la Estraro de UEA, periodo kiu koincidas kun planoj de aliaj organizaĵoj, aparte en Eŭropo. Pro tio ne necesas ripet

kion ni jam raportis en nia revuo, en Gazetaraj Komunikoj kaj tra la diversaj sociaj retejoj kaj en plej diversaj ĉeestaj kaj virtualaj renkontiĝoj, kiuj karakterizis la evoluon de niaj novaj komunik-rimedoj. Tamen mi prenos la okazon por resumi la plej gravajn taskojn surbaze de niaj pasintjaraj diskutoj kaj spertoj.

Turni nin eksteren estu la ĉefa fokuso de nia laboro

Kiam ni planas nian plej gravan "eksteran" agadon, ĉu la jenaj estas, aŭ estu, niaj celoj?

- Informadi pri Esperanto (je ĉiuj niveloj, de personaj konversacioj al amas-komunikiloj).
- Konsciigi la publikon pri lingvaj kaj komunikaj problemoj solvendaj en nia

hodiaŭa mondo.

- Subteni amasan lernadon de nia lingvo, instruante per ĉeestaj kaj retaj klasoj kaj lerniloj.
- Partneri kun aliaj organizaĵoj kie ekzistas konstatablaj koincidoj inter iliaj idealoj kaj la niaj.
- Evidentigi nian aktivan solidarecon kun progresema, pacema agado kiu helpas la homaron.

Ni konsideru ĉiam la jamajn interesojn kaj personajn celojn de eventualaj allogitoj kaj partneroj, por ke ili klare spertu la kialojn daŭrigi sian uzadon de la lingvo aŭ rilatojn kun ni. Atento pri tiu faktoro povas esti inter la plej frukto-donaj ideoj por certigi nian estontan progreson.

Mi donu du tute malsamajn ekzemplojn de utila agado tiucele. Persone, mi loĝas en vilaĝo nacie registrita kiel historie interesa kaj konservinda, kiu organizas ĉiujare antaŭ-Kristnaskan festvizitadon al niaj muzeo, preĝejoj, komercejoj, kaj plej alloge dekoraciitaj hejmoj de enloĝantoj. Mi kun la edzino akceptis partopreni kaj intervjuiĝi por ĉi-jara prepar-artikolo en la plej granda regiona ĵurnalo. Mi menciis mian oficon en UEA, kaj klarigis kio estas Esperanto. La ĵurnalisto tre bone spegulis tion en la artikolo, kaj rezultis kelkcent vizitantoj el la plurmil kiuj evidente legis la artikolon. Publika konsciigo pri tio kio estas nia lingvo.

La dua pli signifa ekzemplo estas la ĵus okazinta forumo de la Ne-Registaraj Organizaĵoj (NROj) de Unesko en Ota

vo, Kanado, por prepari la oficialan lanĉon de la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj kaj la Jardeko de Oceanoj (ambaŭ endanĝerigitaj kaj bezonantaj publikan edukiĝon pri tiu danĝero). Pro iom lastmomenta organizado, malmultaj ĉeestis persone, sed pli multaj partoprenis virtuale. Niaj reprezentantoj inkluzivis Profesoron Francis Hult, kiu prizorgas niajn rilatojn ĉe UN en Novjorko, kaj Profesoron Mark Fettes, nian eksprezidanton kaj reĝisoron de la rilata Kongresa temo en Montrealo. La unua brile kunigis la temojn, kaj la dua tre klare indikis la neceson de transformiĝo de la eduksistemo por progresigi akcepton de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj. Pluraj laŭdoj, demandoj, dankesprimoj rezultigis pliajn kontribuojn de la prezentintoj. Krome, nia Estrarano kaj reprezentanto ĉe Unesko en Parizo François Lo Jacomo estis inter la ĉeestantoj, kaj havis la okazon saluti kaj reliefigi la kontribuojn de la reprezentantoj de UEA. Granda helpo por plifortigi nian partnerecon, kaj la akcepton de la seriozeco de niaj kontribuoj al la laboro (ankaŭ mi ĉeestis virtuale, kaj estis partopreninta en virtuala preparokunsido kiel Prezidanto de UEA, pro kio dankis la organizanto). Ni devas esti atentaj al oportunaj lokaj kaj internaciaj okazoj por plifortigi niajn rilatojn kun komunumoj, kiuj pli favoros akcepton de la ideo de Esperanto, se ni kontribuos al iliaj interesoj.

Solidigi nian internan strukturon por ebligi progreson al tiuj celoj

Kiam ni planas organizi nian "internan" agadon por subteni la eksteran, kio estas farenda?

Ni konkludos post konsidero laŭ la ĝis-

nunaj diskutoj de minimume jenaj ideoj kaj bezonoj.

Aldonoj kaj prioritatigo necesos, sed ĉio akceptita estu praktike mezurebla kaj realigebla.

Ni efektive jam progresigis preskaŭ ĉiujn, sekve ĉio estas farebla kaj taksebla laŭ rezultoj.

- Krei veran komunumon interne de UEA kaj kun ekster-Asociaj konvinkitoj pri Esperanto.

- Daŭrigi pli intiman kunlaboron de UEA kun TEJO, ILEI kaj kernaj subtenaj fakaj asocioj.

- Fari en nia Asocio la strukturajn ŝanĝojn, kiuj necesas por niaj ŝanĝigantaj cirkonstancoj.

- Daŭre plibonigi kaj pliefikigi la servojn de UEA por allogi ĉiam pli da membroj.

- Fari tiujn servojn kaj membrecon maksimume alireblaj por ĉiuj interesatoj.

- Glatigi pacience la necesajn transirojn por tiu pliefikigo (financoj, Libroservo ktp).

- Eklabori la plej trafajn vojojn por komunikado kun kaj inter la membraro.

- Konstati kion bezonas niaj membroj por ke ilia tempoinvesto estu maksimume valora.

- Subteni kaj pliampleksigi agadojn kiuj montriĝis esti pli ol normale sukcesaj.

- Trovi la ĝustan ekvilibron inter ĉeestaj, hibridaj kaj virtualaj kongresoj, forumoj, renkontiĝoj.

- Provizi per gvidiloj por orientiĝo de novaj laborantoj aŭ taskitoj kiel lokaj kongresaj organizantoj.

- Daŭre subteni ĉeeston kaj virtualan trejnadon por plikapabligi niajn aktivulojn.

- Inkluzivigi en la strukturo konkretan apogon al niaj laborantoj kun plena utiligo de ĉies talentoj.
- Konsciigi la membraron pri la bezono sin dediĉi al specifa persone elektita kunlabora agado.
- Konservi nian kulturan heredaĵon, kuraĝigi sciencan esploron pri Esperanto-rilataj temoj.
- Celi daŭripovan financon stabilecon por subteni kaj ĉiam pli ampleksigi nian agadon.

La pasinta jaro bezonis grandajn fortostreĉojn de nia Ĝenerala Direktoro, la tuta Estraro, la nova Kongresa teamo, kaj multaj aliaj. Ni tamen sukcesis aranĝi interalie pri la profesia konservado de la arĥivo de UEA, kaj havas bonan perspektivon pri la estonta profesia prizorgo de la kolekto de la Biblioteko Hector Hodler. Ni sukcesis denove, kun malmulte da prepar-tempo pro aliaj premoj, okazigi la 3-an Virtualan Kongreson en novembro. Kaj nun ni dediĉas pli da tempo al nia estonta strategio, ĉar pliklariĝas la direkto kiun ni devas sekvi. Vi povis informiĝi pri multaj aliaj atingoj kaj bonaj novaĵoj, kaj ni plenkore esperas ke la kondiĉoj ebligas la longe sopiratan Afrikan UK en 2024. Ni bezonos ĉies subtenon post la decido kaj anonco, per ĉeesto kaj donacoj por ebligi la plenan partoprenon de afrikanoj de ĉiuj partoj de la kontinento.

Konklude, mi ne povas ne mencii la evoluon en la monda situacio, kiun malmultaj antaŭvidis kiam mi skribis mian pasintjaran mesaĝon. Ni devis alĝustiĝi al pandemio kaj poste subite al konflikto kiu skuis nian vivon, ĉar ĝi plurilate tuŝis preskaŭ ĉiujn. Vi eble

memoras ke mia 5-a punkto en mia pasintjara mesaĝo estis "Kion konsilis Zamenhof por sukcesigi Esperanton?". En 1908, li kun kontento povis deklari: "Se ni marŝos en tia sama harmonio kiel ĝis nun, neniam forto en la mondo povos haltigi nian iradon... De nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco." En 1910 li atentigis ke "konkordo estas la plej certa garantio de senduba sukceso, malkonkordo signifas la morton." Pli forte en 1912 li avertis: "laboru ĉiam en plena unueco. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide...".

Mi citis tion "ne ĉar ni trairas momenton de malpaco en nia movado. Tute male, mi havas grandan senton de konkordo..." malgraŭ skuaj decidoj pri la estonteco de UEA. Mi tamen atentigis ke nur reciproka respekto protektos nin de ofendemo kaj ofendiĝo kiam diverseco de opinioj minacos la delikatan ekvilibron de demokratia aŭskultado de ĉies opinioj survoje al signifaj decidoj. Mi ne celis profeti, sed la ekstera konflikto kiun ni daŭre spertas, kaŭzis en nia movado grandajn tensiojn, kiuj neeviteble okupis ankaŭ la Estraron. Ni vidis debatojn pri la signifo de "neŭtraleco" por UEA, kaj kian pozicion havu la Asocio. Evidentiĝis ke vojo por harmoniigi la perspektivojn en la movado simple ne estus trovebla. Ankaŭ por la Estraro ne estis facile trovi la zamenhofan konkordon. Konsciante nian respondecon laŭeble esti tia modelo, praktike ni interkonsentis senpreme ke ni subtenos niajn Estrarajn interkonsentojn kaj decidojn rilate publikajn elpaŝojn, kiujn ni alĝustigis por maksimuma kon-

sento, sed lasos plenan liberecon al individuaj estraranoj esprimi ankaŭ publike sian personan starpunkton. Tiel ni sukcesis aŭskulti, modifi niajn opiniojn kaj reciproke respekti la kolegojn. La vojo kiun ni elektis kiel Estraro, ne inkluzivis punon de individuoj aŭ grupoj, sed aktivan interagadon kun la koncernatoj por provi kompreni kaj atingi reciproke akcepteblan konkludon. Ni ne solvis ĉiujn situaciojn, sed almenaŭ celis agi laŭ zamenhofaj principoj.

Mi finos per la sama frazo, kiun mi skribis antaŭ unu jaro: "Nia tasko estas lerni kaj montri al la mondo kiel nia mirinda instrumento sukcese ebligos transponti personajn kaj kulturajn valojn por ke ni sentu nin veraj mondĉivitanoj kaj laboru por ekzempligi tiun pli bonan mondon al kiu ni ĉiuj sopiras".

laŭ Esperanto 1/2023

Biblioteko Hodler iros al Pollando

La estonteco de la biblioteka kolekto de UEA nun estas sekurigita. La Aŭstra Nacia Biblioteko akceptis 5% da materialoj. La restanta parto de la kolekto de Biblioteko Hector Hodler estos transdonita al la Pola Nacia Biblioteko en Varsovio. En Pollando apartenas Esperanto al Nemateria Kultura Heredaĵo kaj Varsovio estas naskiĝloko de Esperanto.

Laŭ kontrakto ekzistas kondiĉo, se iam la Pola Nacia Biblioteko rezignos pri iu parto de la kolekto, UEA povos rehavigi ĝin aŭ transdoni ĝin al tria partio.

Pri la transdono informis reta informejo *Libera Folio*.

“GLORIA ARTIS”: POLA MINISTERIA MEDALO POR ROMAN DOBRZYŃSKI

Danke al iniciato de Pola Esperanto-Asocio (PEA), en la 10-a de novembro 2022 la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo de Pollando, Prof. Hab. D-ro Piotr Gliński, decidis aljuĝi al la fama pola esperantisto Roman Dobrzyński gravan ministerian distingon: la bronzan medalon Merita por Kulturo “Gloria Artis”. En sia propono PEA emfazis la signifan kontribuon de Dobrzyński por popularigado de kulturo ĝenerale kaj liajn meritojn kiel prezidanto de PEA, kiam en 1987 li ĉeforganizis la plej grandan Universalan Kongreson, en Varsovio; kaj kiel televida raportisto li realigis ĉ. 300 dokument-filmojn.

Roman Dobrzyński naskiĝis en 1937 kaj esperantistiĝis en 1955. Li magistr-iĝis pri juro kaj poste pri ĵurnalismo per tezo pri la Esperanta gazetaro. Kiel studento li estis vicprezidanto de TEJO (1966-68) kaj redaktoro de *Kontakto* (1968-70). De 1973 ĝis 2003 li laboris kiel ĵurnalisto de Pola Televido kaj en tiu rolo multfoje traktis Esperanto-rilatajn temojn. Jam en 1980 la Asocio de Polaj Ĵurnalistoj elektis lin la plej bona publicisto pri internaciaj aferoj. En 1995 li iniciatis la esperantigon de “Mazi en Gondolando”. Li estis unua prezidanto de Fondumo Zamenhof, komitatano kaj vicprezidanto de UEA (1989-92), ekde 2005 Honora Membro. En 2003 aperis lia libro *La Zamenhof-strato*, pri interparoloj kun D-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, sekve tradukita en multajn lingvojn.

Laŭ GK de UEA, n-ro 1081

**Výsledek hospodaření ČES za rok 2022, plán na rok 2023
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

Příjmy	pl.2022	sk.2022	pl.2023		
Příspěvky na běžný rok	13 000	10 760	11 000	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2022 peněžní prostředky pokladna korunová 2 800 pokladna eurová 0 ceniny 0 účet Fio 100 účty Fio spořicí a termínované 470 330 peníze celkem 473 230 změna vůči 31.12.2021 -9 548 investice podílové listy 123 058 investice celkem 123 058 změna vůči 31.12.2021 -45 431 pohledávky UEA subkonto 59 447 České překlady 8 100 pohledávky celkem 67 547 změna vůči 31.12.2021 36 922 ostatní majetek ČES drobný majetek v ceně pořízení 209 894 knihy v libroservu (inventura) 145 515 ostatní majetek ČES celkem 355 409 změna vůči 31.12.2021 20 856 závazky UEA subkonto 0 platby pro UEA 59 680 závazky k členům 0 závazky celkem 59 680 změna vůči 31.12.2021 36 184 účelově vázané prostředky fond Tilio 27 392 fond ediční 12 660 fond Cigno 21 388 sekce nevidomých 20 279 klub Mladá Boleslav 16 618 klub Ratíškovice 8 246 pedagogická komise 6 247 klub Karlovy Vary 4 187 klub Havířov 3 052 klub Písek 2 673 klub Česká Lípa 2 215 klub Benešov 1 557 klub Tábor 1 314 klub Přerov 1 366 klub Opava 1 079 klub Vítkovice 992 klub Šumperk 641 klub Hranice 624 klub Ústí nad Labem 542 celkem 133 072 změna vůči 31.12.2021 -1 996	
Příspěvky na budoucí rok	17 000	17 974	18 000		
Dary členů	10 000	7 520	10 000		
Dary nečlenů		900			
Dotace		0			
Starto předplatné		0			
Konference a sjezdy	80 000	53 054	80 000		
Činnost klubů a sekcí bez PS		0			
Muzeum		0			
Libroservo	19 000	17 980	19 000		
Kurzy esperanta	2 000	600	2 000		
Příspěvky UEA ind. běžný rok		1 490			
Příspěvky UEA ind. bud. rok		17 431			
Platby UK na běžný rok		24 880			
Platby UK na budoucí rok		35 690			
Platby ILEI a pedagog. komise		1 220			
Úroky z účtů	200	1 191	20 000		
Virtuální adresa	200	0			
Příjmy celkem	141 400	190 690	160 000		
Výdaje	pl.2022	sk.2022	pl.2023		
Starto tisk	20 000	23 784	24 000		
Starto distribuce	17 000	15 425	17 000		
Konference a sjezdy	80 000	57 389	80 000		
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	0	5 000		
Provoz ČES, internetové služby	2 500	926	2 500		
Jízdné funkcionáři	5 000	0	5 000		
Přísp. na stravné za schůze	700	0	700		
Muzeum	20 000	584	20 000		
Libroservo nákup zboží	19 000	24 680	19 000		
Libroservo poštovné a balné	300	0	300		
Kurzy esperanta	200	325	300		
Příspěvky UEA ind. běžný rok		15 886			
Příspěvky UEA ind. bud. rok		0			
Platby UK v běžném roce		4 295			
Platby UK na budoucí rok		0			
Platby ILEI a pedagog. komise		1 193			
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 417	1 500		
Kolektivní členství v EEU	1 300	1 243	1 300		
Blahopřání, kondolence	1 500	2 140	1 500		
Poplatky		0			
Daň z úroku	40	226	3 000		
Nový majetek	50 000	0	50 000		
Výdaje celkem	224 040	149 513	231 100		

Festo de beata Odoriko, la 14-an de januaro 2023

Aŭtune 2022 aperis en nia Esperantomuzeo en Svitavy s-ro Jiří Altior (legu: alcior), 48-jara muzikisto, kiu sin prezentis kiel parenco de Stanislav Schulhof (lia avino estis fratino de Schulhof), tial li komencis interesiĝi pri Esperanto, pri Schulhof kaj plie pri kulturo de teo. Kun sia edzino Beata (kantistino kaj muzika pedagogino) li fondis **Instituton por Renaskiĝo de Kultura Heredaĵo** kaj planas tie utiligi la internacian lingvon.

Ili ankaŭ interesiĝas pri Odoriko de Pardenone, franciskana monaĥo, kiu kelkajn jardekojn post Marco Polo vizitis



orientajn landojn, en ĉinia urbo Ĥanbalik restis sub protekto de la reganta ĥano tri jarojn kaj disvastigadis kristanismon. Piede li trairis 20 mil kilometrojn kaj revenis preskaŭ nereconebla.

Lian rakontadon registris kelkaj monaĥaj fratoj kaj tiel estiĝis lia priskribo de la orientaj landoj. Por ni estas interese, ke lia patro estis soldulo, kiu venis en Italujon kun nia reĝo Přemysl Otakar II, do estas verŝajne, ke li estis ĉeĥo aŭ almenaŭ bohemiano (Tial Odoriko estas nomata ankaŭ Oldřich Čech z Furlánska). Odoriko estis beatigita kaj jam en la mezepoko estiĝis pri li latina himno, kiun s-ro Altior tradukis en la ĉeĥan kaj petis min esperantigi la kanton.

Por omaĝi datrevenon de forpaso de beata Odoriko (14 januaro 1331) la instituto preparis kulturalan programon en franciskana klostro ĉe la Preĝejo de

Virgulino Maria la Neĝa proksime de la Venceslaa placo kaj invitis ankaŭ dekon da esperantistoj. La festo okazis sabate la 14-an de januaro 2023.



Jiří Altior bonvenigas ĉeestantojn kaj disdonas broŝureton kun programo

Himno al Odoriko

Gloras la Patron multaj piaj fratoj,
preĝe adoras la bonan patronon,
laŭdante liajn agojn en Ĉinio,
regno, regno la fora.

Savon li portis al popoloj nombraj,
demon-minacojn pelis Odoriko,
kredon Tataroj de li tuj adoptis,
falon, falon timante.

"Mia martira sango," li mem diris,
"ŝprucu sur landojn dronajn en mallumo,
savon, Sinjoro, por eterna tempo
portu, portu al ili."

Povrajn li nutris, la humilajn levis,
vundojn de Kristo kisis ĉiutage,
preĝis sincere Virgulinon Sanktan
per kor', per kor' fidela.

Frato Beata, Odoriko brava,
pruvi ni volas pietaton altan,
sangon oferi: palmon de martiro
premi, premi per polmoj.

Post enkonduko de Jiří Altior, s-ino Beata Altior kantis la himnon latine, ĉefe kaj esperante, poste parolis d-ro Vladimír Liščák, kiu en la jaro 2019 eldonis 660-paĝan libron *Bratr Odorik a jeho zpráva o východních krajích světa* (Frato Odoriko kaj lia raporto pri la orientaj regionoj de la mondo). Ankaŭ esperantistoj ricevis la vorton, mi pri mia tradukado de la himno, Jiří Tomeček kaj Leonarda Chaloupková pri agado de ĈEA, Pavol Kaščák pri Esperanto kaj teo. Petr Chrdle atentigis ne nur pri siaj libroj, kiuj tie estis aĉeteblaj, sed li havis ankaŭ bonegan prelegon pri Stanislav Schulhof.



S-ino Beata Altior kantas la himnon

Post sankta meso en la apuda preĝejo ni vidis filmon *Až zařve lev* (Kiam ekmuĝos leono) de reĝisoro Jan E. Svatoš, kiu post la filmo respondis plurajn demandojn. En la filmo renkontiĝas en Purgatorio la animoj de Odoriko kaj Přemysl Otakar II. kaj rememoras pri siaj vivoj. La parolantojn ni ne vidas, nur aŭdas, sed la rakontado estas akompanata de scenoj pri bataloj de la reĝo kaj pri pilgrimado de la monaĥo.

Estis tie ankaŭ aliaj muzikistoj, kiuj violonis kaj pianludis, junaj kristanoj,

kiuj disdonis al ni vespermanĝon, kaj centjara monaĥo, kiu kun nekredibla vicleco rakontis pri sia vivo de iama konstruktisto en Ŝkoda-fabriko kaj nun franciskana monaĥo.



La geedzoj Altior intencas kunlabori kun esperantistoj pri la kultura heredaĵo kaj pri la kulturo de teo.

Miroslav Malovec

<https://www.chamberoftea.com/>



Kontribuo de esperantistoj al la programo

La 7-a LUMINESK' en Heilbronn

27.12.2022-3.1.2023

Dank' al la laboro kaj la entuziasmo de Andreas Diemel, helpita de GEA, estas okazo renkontiĝi jarfine ĉe Luminesk'. Paralela E-renkontiĝo nomiĝas NoRo. Finfine post longa paŭzo pro la pandemio de koronaviruso la aranĝo povis okazi en la universitata urbo *Heilbronn*, kiu situas en la norda parto de la federacia lando *Baden-Württemberg* ĉe la rivero *Neckar*. La vinkultivado tie havas longan tradicion. Temas precipe pri ruĝaj specioj de vinberoj.



La aranĝon partoprenis kvindeko da geesperantistoj el dek landoj. Dum la unua vespero Barbara Brandenburg prezentis vingustumadon de kvin malsamaj vinoj. La sekvan tagon dum la antaŭtagmezo ni povis ĉeesti du prelegojn. La unua temis pri "La arkta zono hodiaŭ - aspektoj, ekonomio kaj politiko", kiun lerte kun akompanaj bildoj prezentis Ulrich Brandenburg. La dua prelego temis pri "La komunejo - bild-datenbanko de la vikipedioj" prezentita de Renardo Fössmeier. Kristin Tytgat gvidis E-konversacion por interesatoj.

Posttagmeze Christoph Roether interese prelegis pri "Luno, suno kaj tajdo - kiel ili interrilatas". Poste okazis ateliero de JoMo pri kantoverkado. Pro la influo de la ĵus finita prelego pri kosma fenomeno estis facile elekti temon:

"Tajdo". JoMo unue prezentis la skemon, donis regulojn kiel verki tekston kaj samtempe komponi muzikon. Li uzis sian malgrandan "vojaĝgitaron" kaj laŭ naskiĝmonatoj de la ĉeestantoj li tuj havis la notojn, kiujn li transformis al muziko. Vespere ni per bildoj spektis Baden-Virtembergan prezenton fare de Edmilson Lima Serejo. En gufujo oni povis refreŝiĝi per biero aŭ teo. Tie Debora McCarney rakontis al ni pri la pitoreska urbeto *Vitoria Gasteiz* situanta en eŭska parto de Hispanio. Belaj bildoj akompanis ŝian prelegon.



Vendrede okazis la tuttaga ekskurso al proksimaj lokoj de *Heilbronn*. Necesis uzi nur buson kaj trajnon. En *Neckarsulm* partoprenantoj vizitis la "Biciklan muzeon" kun multe da eksponaĵoj. Poste oni daŭrigis al la historia la centro de la urbo *Bad Wimpfen*. Tre ĉarma urbeto kun multaj trabfakaj domoj inter kiuj elstaris unu bele pentrita. Vespere gesinjoroj Brandenburg prezentis Torinon, la venontan UK-urbon al kiu ili allogis nin per aperitivo Martini, kafo kaj ĉokolado. Do, tio estis bona instigo por iri al Italio. Mi alportis kvin albumojn pri IF-o, tiel la partoprenantoj povis revidi sin plijunaĝaj. Poste, en la gufujo kiun prizorgas gesinjoroj Kleemann, Andreo Grossmann rakontis ŝercojn.

Sabate Dieter Rooke parolis pri la historio de SAT kaj Franz Kruse klarigis "Kiel GEA perrete organizas kongresojn".



Post la tagmanĝo Amri Wandel prezentis tute novan prelegon "Ĉielaj gastoj: meteoroj, kometoj kaj asteroidoj". Ĉe la fino kelkaj plenigis demandaron por poste ricevi atestilon pri sukceso.

Denove daŭris la ateliero de JoMo pri kantoverkado. Sekvis Silvestra vespera bufedo kaj koncerto de JoMo, kiu dancigis la ĉeestantojn. Li ĉiam scias krei admirinde belan etoson. Poste la balo povis komenciĝi per polonezo. Je la 11-a horo vespere venis Novjara bonvenigo el Israelo kaj Latvio. Jam antaŭ la noktomezo aŭdiĝis unuaj antaŭsignoj de la baldaŭa Novjara alveno ĉe ni. Per bondeziroj, ĉirkaŭbrakado kaj kisado ni bonvenigis la Novan jaron 2023-an kaj poste denove dancis.



Dimanĉe antaŭtagmeze ni povis spekti bildprezenton pri la insulo Reunio, Madagaskaro kaj Sudafriko fare de Jöel Fontaine kaj Laure Wolff. Poste Amri Wandel prezentis filmon pri Tanzanio, kie devus en la jaro 2024-a okazi la UK. Post la tagmanĝo ni profitis belan sunan posttagmezon por promeni. Iuj ŝatis fari paperfaldadon, kiun instruis Gisela


Schröer. Post la reveno la kantoverkado estis sukcese finita kaj vespere prezentita al la cetera publiko. Samtempe okazis disdonado de atestiloj al la sukcesintoj de la ĉi-foja IVU-sesio aranĝita de Amri.

La antaŭlastan tagon Edivaldo Simao de Freitas prezentis la lokan brazilan movadon en Fortalezo.



Pli precize li parolis pri sia vivo kaj esperantistiĝo. Poste Jaŝo prezentis "La Decamerone" de Giovanni Boccaccio. La posttagmeza ekskurso gvidis la partoprenantojn al la kastelruinoj *Weibertreu* kaj al la malgranda urbo *Weinsberg*. Vesperon okupis subtitolita filmo "La poŝtisto". Dum la adiaŭa vespero estis okazo por ĉiuj, kiuj volis improvize sin prezenti. Per tio la semajna aranĝo finiĝis.

Korajn dankojn al la organizantoj de tiu ĉi agrabla evento, kie oni sentas sin en familia etoso kaj ĝuas la lastajn tagojn de la jaro.



Liba kaj Floreal Gabalda



Prelego pri F. V. Lorenc en Čáslav

La 21-an de februaro 2023 okazis en nove alkonstruita parto de Dusík-teatro en Čáslav prelego de Libuše Dvořáková el Svitavy kun temo „F. V. Lorenc“. Pri la prelego ŝin petis sekretariino de Muzea kaj Patrujsciencia Societo „Včela Čáslavská“ (Abelo de Čáslav) s-ino Drahomíra Nováková.



La urbo Čáslav estas bela historia urbo kaj dediĉas grandan atenton al siaj konataj naskiĝintoj, kvankam Lorenc naskiĝis ne ĉi tie, sed en proksima vilaĝo Zbyslav, tamen studis en la gimnazio de Čáslav, same kiel verkisto Rudolf Těsnohlídek (1882-1928) kaj poeto Jiří Mahen (1882-1939). La urbo Čáslav en la jaro 2012 transdonis la naskiĝ-ateston de Lorenc al liaj genepoj, okaze de senŭualigo de monumento en la brazila urbo Dom Feliciano. La monumenton senŭualigis ambasadoro de ĈR Ivan Jančár kaj ĝenerala konsulo Pavel Procházka.

L. Dvořáková en sia prelego prezentis

al la aŭskultantoj la vivon de la naskiĝinto en Zbyslav, František Vladimír Lorenc (1872-1957), kiu eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj, tiam nomataj ankoraŭ bohemoj. En la jaro 1903 pro politikaj motivoj li elmigris al Brazilo kaj ŝanĝis sian nomon al Francisko Valdomiro Lorenz. Dank' al sia riĉa agado (verkisto, tradukisto, poligloto, kuracanto, instruisto, astrologo, astronomo, homeopato, esperantisto, ĉefa reprezentanto de esotera rondeto kaj renoma mediumo) li fariĝis tria plej fama ĉeĥo en Brazilo post la prezidento Kubitschek kun la ĉeĥaj radikoj kaj post la entreprenisto Jan Antonín Baťa, kiu tien elmigris ankaŭ. Ĉiujn informojn pri Lorenc la prelegantino ĉerpis el libro de prof. Vlastimil Novobilský „František Vladimír Lorenc“ kun subtitolo „Atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo“, kiun eldonis la eldonejo KAVA-PECH ĉeĥlingve kaj en traduko de Margit Turková ankaŭ esperantlingve.

Inter la aŭskultantoj estis ankaŭ iu sinjorino el Zbyslav kaj ŝi estis tre surprizita, kia geniulo naskiĝis en ŝia vilaĝo. La naskiĝdomo de F. V. Lorenc estas nun riparata kaj espereble ni baldaŭ ĝisatendos eĉ memortabulon.

Plie, inter la aŭskultantoj estis ankaŭ esperantistoj, kiuj ne engaĝas sin en la movado, tamen havas jam spertojn kun utiligo de Esperanto. La aŭskultantoj tre interesiĝis pri la lingvo kaj la prelegantino ilin invitis al Esperantomuzeo en Svitavy.

Libuše Dvořáková

LA EŬROPA PARLAMENTO APERIGIS RAPORTON PRI MULTLINGVISMO, KIU CITAS ESPERANTON KIEL LOGIKAN, VIVANTAN LINGVON

La klopodoj de la eŭropaj esperantistoj, kiuj faris proponojn kaj subtenis tiujn proponojn pri Esperanto la pasintan jaron en la tiel nomata Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, ne estis vanaj. La Komitato pri Kulturo kaj Edukado de la Eŭropa Parlamento (CULT) ĵus publikigis gravan studon kun la titolo "La aliro al multlingvismo en la komunika politiko de la Eŭropa Unio" (la aŭtoroj estas D-ro Michele Gazzola kaj 5 kolegoj).

La studo taksas la lingvan politikon de Eŭropa Unio surbaze de profunda jura analizo kaj la uzon de la oficialaj lingvoj en 1,5 milionoj da retpaĝoj de 13 EU-instituciaj retejoj, kaj la lingvokapablojn de eŭropaj plenkreskaj loĝantoj. La studo estas elŝutebla ĉe:

[http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU\(2022\)699648_EN.pdf](http://www.europarl.europa.eu/RegData/etudes/STUD/2022/699648/IPOL_STU(2022)699648_EN.pdf)

Neoficialaj tradukoj en ĉiuj eŭropaj lingvoj estas haveblaj ĉi tie:

<http://www.europokune.eu/index.php?article9/multlingvismo-de-europa-unio-en-sia-komunikada-politiko>

En la paĝo 76-a la raporto konstatas, ke "Ne ekzistas komuna lingvo en EU parolata je tre bona nivelo (t.e. denaska aŭ scipova) de la plimulto de la loĝantaro" kaj en la paĝoj 84-85 estas emfazata la graveco de la lernado de duaj lingvoj, kaj estas citita kiel ekzemplo la programo "Multilingva Akcelilo", la plej voĉdonita inter la proponoj en la eduka sektoro en la

Cifereca Plurlingva Platformo de la Konferenco pri la estonteco de Eŭropo en 2022. La programo Plurlingva Akcelilo montris signifan kaj rapidan plibonigon de la lingvokapabloj de 8 ĝis 9-jaraj lernejoj, kiuj akiris tiujn kapablojn unue lernante zorge elektitan, limigitan kvanton de vivanta, logika lingvo kiel Esperanto.

La Komisiono de UEA por Agado en Eŭropo kaj la Eŭropa Esperanto-Unio dankas ĉiujn eŭropajn esperantistojn, kiuj subtenis niajn proponojn por Esperanto kaj aparte doktoron Michele Gazzola, kiu partoprenis la redaktadon de la nun aperigita raporto kaj invitas ĉiujn partopreni la estontan kampanjon por utiligi tiun mencion en nia informala laboro.

La materialo aperis ankaŭ ĉeĥe kaj slovake.



Laŭ GK de UEA, n-ro 1080

51-A INTERNACIA INFANA- ADOLESKANTA KONGRESETO (IIK) INVITAS!

Lige kun la 108-a UK en Torino okazos samtempe, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonte, Italio. Bonvenon viziti la retejon de IIK: iik.uea.org.

La temo de la kongreseto estas “Sporto kaj Naturo”.

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj atelieroj kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendos la infanojn kaj adoleskantojn. Eksciu pli pri la programo.

IIK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton (minimуме – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto):

- infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj
- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj flue parolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron / prizorganton / vartiston dum IIK.

En la retejo vi trovos pliajn informojn kaj la aliĝilon, kie ĉiu infano povas indi-

ki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al:

infana.kongreseto@gmail.com.

Ni ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskuloj el nepagipovaj landoj en la IIK per mona donaco al la kongreseto (uea.org/alighoj/donacoj UEA-kontoj: Adoptaj Gepatroj kaj Infana kongreseto). Ni kore dankas ĉiujn donacantojn.

Bonvenon al la Torina IIK!

UNESKO-kurieroj



Ĉe la UEA-retejo estas elŝuteblaj du novaj Unesko-kurieroj:

2/2022 Tradukado: De unu mondo al alia

Ĉu tradukistoj bezonas simili la aŭtorojn, kiujn ili tradukas? La tradukisto, ĉu endanĝerigita specio?

3/2022 Kulturo: tutmonda komuna bono

Necesas plibonigi la integradon de la diverseco en kinematografio. Islando: Nova rigardo al malnova lingvo

10 JAROJ DE “BELARTA RIKOLTO”: PREMIITAJ VERKOJ DE LA BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA

Ekde novembro disponeblas en la Libroservo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) la libro “Belarta rikolto 2022”, kun premiitaj verkoj de la 73-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA, anoncitaj ĉi-jare en la 107-a Universala Kongreso (UK) en Montrealo. La libro estas parto de la eldona agado de UEA kunlabore kun la eldonejo Mondial el Novjorko. Kun 121 paĝoj ĝi enhavas poezion, prozon, mikronovelojn, teatraĵojn, monologojn/skeĉojn, eseojn kaj kantotekstojn. Eblas ĝin aĉeti rekte en la Libroservo:

<https://katalogo.uea.org?inf=8614>.

Laŭ la [regularo](#) de la Belartaj Konkursoj la premiitaj verkoj estas aperigitaj en eldonaĵo subtenata de UEA. Ekde 2013 Mondial publikigas ilin sub la titolo “Belarta rikolto”:

<https://mallonge.net/belarta>.

Tio signifas, ke la “Belarta rikolto 2022” estas la deka en la serio. Aldone, en 2021 Mondial aperigis la libron “[Ne ekzistas verdaj steloj](#)”, kun 60 mikronoveloj rikoltitaj el la Belartaj:

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=8783>

UEA forte rekomendas akiri kaj legi ĉiujn tiujn eldonaĵojn por kultura riĉiĝo kaj subteno al la kulturo en Esperanto. En 2023 la premiceremonio de la 74-a okazigo de la Belartaj Konkursoj okazos dum la 108-a UK en Torino.

Interesatoj povas sendi kandidatajn verkojn ĝis la 31-a de marto 2023. La alvoko kun ĉiuj detaloj legeblas ĉe

<https://uea.org/gk/1063>. Ĉefrespondecas pri tiu agado la [Komisiono pri la Belartaj Konkursoj](#), kiu ankaŭ tenas specialan paĝon pri la konkursoj ĉe Facebook: <https://www.facebook.com/belartajkonkursoj>.

Titolo	Belarta rikolto 2022 Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio	
Kategorio	Miksita literaturo	
Prezo	10.80 €, sesona rabato ekde 3 ekz.	
Eldonloko, jaro	Novjorko, 2022	
Eldoninto	Mondial	
Klarigoj	Poezio, prozo, mikronovelo, teatraĵo, monologo/skeĉo, eseo, kantotekstoj.	
Kontribuantoj	Redaktis teamo	
ISBN/ISSN	9781595694386	

Aliaj literaturaj novaĵoj

- **36 pejzaĝoj de la minurbo Aŝio.** Hori Jasuo, Tatjana Loskutova.
- **Beletra Almanako 44 (Junio 2022).**
- **Esperantologio / Esperanto Studies.** Nova Serio / New Series 3 (11).
- **Kurso de ĝenerala lingvistiko.** Ferdinand de Saussure.
- **Patrino Shega kaj kvin junulinoj.** Adem Demaçi.
- **Raporto pri la unua vojaĝo ĉirkaŭ la terglobo.** Antonio Pigafetta.
- **La Senfina funebra procesio.** Visar Zhiti.
- **KD: Ĵunko kantas Esperante.**

La Ora Trezoro de Košice

Helpe de retaj informoj kompilis kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa respubliko

La Ora Trezoro de Košice estas aro da 2.920 oraj **moneroj**, tri oraj **medaloj** kaj ora **renesanca ĉeno** malkovrita dum la fosado de fundamentoj por nova konstruaĵo de Financa Direktorejo en Košice en 1935. La unika kolekto, kiu datiĝas inter la 15-a ĝis la 17-a jarcentoj, estas unu **el la plej grandaj malkovritaj oraj trezoroj en la mondo.**

Strukturo de la ora trezoro

La trezoro estis metita en renesancan kupran skatolon en formo de pano, kiu konsistas el du interligataj bovloj. La supra bovlo estas ornamita per gravurita ĉasmotivo. La masiva renesanca ĉeno longas 2,14 metrojn kaj pezas 590 gramojn.

La trovaĵo enhavas tri orajn medalojn. Du el la jaroj 1526 kaj 1544 kun motivo de reĝo Ludoviko Jagellon (1506-1526). La plej rara estas la tria el la jaro 1541. Ĝi estas verko de **Kryštof Fus** (?) kaj estas ĉevalmedalo de reĝo **Ferdinando la 1-a de Habsburg** (1503-1564).

Inter la moneroj estas unu, kiu ne konvenas en la aron de aliaj tiutempaj moneroj. Ĝi estas antikva monero de **trakia nacio**. Tamen, ĝi ankaŭ povas esti imito de monero de la **kelta nacio**. Aliaj tiutempaj moneroj estas hejmaj (Hungario, Transsilvanio), kaj de eksterlanda deveno (Nederlando, Bohemio, Silezio, Aŭstrio, Germanio, Pollando, Italio, Svedio kaj Hispanio).

La nombroj de moneroj de individuaj ŝtatoj, aŭ specialaj teritorioj estas jenaj:

- Transilvanio (nun teritorio en Rumanio) – 257
- Hungario – 1181
- Nederlando (provincoj kaj urboj) – 1016
- Ĉe-

- Ĥaj landoj – 26
- Silezio – 22
- Aŭstrio – 24
- Ĉefepiskopejo de Salzburg – 31
- Germanio (ekleziaj sekularaj bienoj, urboj) – 195
- Pollando – 113
- Svedio – 7
- Danio – 8
- Anglio – 1
- Belgio – 1
- Francio – 2
- Italio – 22
- Hispanio – 13.

La origino de la trezoro

La malplej aĝa monero de la trezoro devenas de la monfarejo Kremnica de la jaro 1679. Surbaze de tio la kaŝado de la trezoro povas esti datita al la jaroj 1680–1682. Laŭ la konsisto de la moneroj en la trezoro, oni povas konkludi, ke ĝia posedanto estis riĉa figuro – eble subtenanto de Habsburgoj. Tion pruvas ankaŭ la loko, kie la trezoro estis kaŝita – en la administra konstruaĵo de la Komerca Ĉambro, t.e. la ĉefa financa institucio kun jurisdikcio por Supra Hungario. La posedanto kaŝis la valoraĵojn sub la kela etaĝo pro timo de ŝtelo.

Sortoj de la trezoro

En 1935, la origina baroka konstruaĵo de la Komerca Ĉambro estis disfalgita por fari lokon al la nova financa estraro. La laboristoj, kiuj malkovris la trezoron, emis komence alproprigi ĝin kaj vendi ĝin. Tamen, post malkaŝo de ilia intenco, la trezoro en sia nerompita konsisto estis direktita al la Ĝenerala Financa Trezoro en Bratislavo, poste al la Centra Ŝtata Trezorejo en Prago. En la jaroj 1941–1942, la trezoro estis prilaborita de numismatika fakulino Emanuela Nohejlová-Prátrová (1900-1995) en la Nacia Muzeo en Prago. Ĉar pluraj landoj estis interesitaj pri la trezoro dum la Dua

Mondmilito, la trezoro estis kaŝita en 1943 en du bone kaŝitaj lokoj ekster Prago.

Ĝi revenis al Koŝice por ekspozicio en 1956 kaj poste nur en 1967, sed ne estis taŭga loko por ĝia konstanta loko en la devenurbo. Tial, en 1969, granda monŝranko estis konstruita en la kelo de la tiea ĉefkonstruaĵo de la Orientslovaka Muzeo. La ekspozicio de la Ora Trezoro de Koŝice estas malfermita al publiko ekde 1970. La trezoron mi vidis proprakule en 1982.

Klarigoj kaj aldonajoj al la teksto

Koŝice estas la dua plej popolriĉa urbo en Slovakio kaj la natura metropolo de la orienta Slovaka regiono (vidu la suban mapon). Ĝi estas la sidejo de la Konstitucia Tribunalo de la Slovaka Respubliko kaj la sidejo de la aŭtonomia regiono Koŝice. En la urbo loĝas 229.040 da loĝantoj, tial ĝi estas unu el la plej grandaj urboj en Slovakio.

Ludoviko Jogajlido la 2a (1506-1526) - Reĝo de Bohemio kaj Hungario kaj margrafo de Moravio. Lia patro estis la ĉeĥa kaj hungara reĝo Vladislav Jogajlido la 2a, kies patrino estis la franca grafino Anna de Foix kaj Candale, kiu „pagis“ la naskiĝon de la longe atendata vira heredanto de la trono per propra vivo.

Ferdinando la 1-a de Habsburg (1503-1564) - Reĝo de la Sankta Romia Imperio, Sankta Romia Imperiestro, Reĝo de Bohemio kaj Hungario, kaj Arkiduko de Aŭstrio. Liaj gepatroj estis la Habsburga Filipo la 1-a „La Bela“ kaj la hispana infanino Jana „La Freneza“. Lia pli maljuna frato Karolo la 5-a iĝis la reĝo de Hispanio en 1516 kaj la romia imperiestro en 1519.

Trakio estas vasta historia teritorio situanta en la oriento de la Balkana Duoninsulo. Hodiaŭ, ĉi tiu regiono ampleksas la teritorion de tri landoj: Bulgario, Grekio kaj Turkio. Trakio estas lavita de la akvoj de tri maroj: Nigra, Egea kaj Marmara.

Keltoj estis la granda grupo da hindeŭropaj popoloj el Eŭropo, karakterizitaj per la uzo de keltaj lingvoj kaj aliaj kulturaj similecoj. La historio de antaŭkelta Eŭropo kaj la specifa limado de la keltoj laŭ etnaj, lingvaj aŭ kulturaj trajtoj estas neklara kaj kondiĉigita de konjekto.

Monfarejo Kremnica - ĝi estas unu el la plej malnovaj ankoraŭ ekzistantaj entreprenoj kaj la plej malnova ankoraŭ ekzistanta monfarejo en la mondo. La urbo Kremnica ricevis la privilegion establi monfarejon la 17-an de oktobro 1328 de la hungara reĝo Karlo Roberto la 1-a de Anĵuo.

La unuaj monfaritaj moneroj estis arĝentaj hungaraj groŝoj. Pli postaj oraj moneroj ankaŭ estis monfaritaj surbaze de la modelo de moneroj de la Itala urbo Florenco kaj tial ili estis nomitaj florinoj. Ili baldaŭ komencis nomiĝi **dukatoj**.

Emanuela Nohejlová-Prátrová (1900-1995) - estis ĉeĥa historiistino, plej elstara ĉeĥa numismatikistino. Ŝi estas konsiderita la fondintino de moderna scienca numismatiko. Ŝi studis historion ĉe la Fakultato de Arto, Karlo-Universitato en Prago. Dum la plej granda parto de sia vivo ŝi laboris en la numismatika sekcio de la Nacia Muzeo (Prago).

En la intencoj de sia loka patriotismo ŝi dediĉis detalajn sciencajn esplorojn al la historio de la benediktina monaĥejo en sia naskiĝa vilaĝo Opatovice apud Elbo, kaj en Prago. Ŝia edzo estis la botanikisto Silvestr Prát.

UEA KONGRESOS EN ARUŜO, TANZANIO, EN 2024

Por la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta en 2024, la Estraro de UEA unuanime elektis Tanzanion kiel kongreslandon. La unuan fojon UK okazos en la kontinento Afriko. La gastiga urbo, Aruŝo, estas internacia turisma destino, sed ne nur: ĝi ankaŭ estas grava diplomacia urbo, la sidejo de la Orient-Afrika Komunumo kaj de la Afrika Kortumo de Afrika Unio.

La regiono de Aruŝo loĝigas pli ol 2 milionojn da homoj. Ĝi troviĝas je la orienta branĉo de la Granda Rift-Valo, sub modera klimato. La grandurbo estas proksima al la Nacia Parko Serengeti, la Konservada Areo Ngorongoro, la Nacia Parko Lago Manyara, la Gorĝo Olduvai, la Nacia Parko Tarangire, la Monto Kilimanĝaro kaj la Monto Meru en la Nacia Parko Aruŝo mem.

La Esperanto Asocio de Tanzanio (EATA) invitis kongresi en Aruŝo post multjara laboro de la Afrika Komisiono de UEA, kiu plenumis la taskon kunordigi la landajn asociojn en la kontinento por difini la invitanton de la unua UK en Afriko. La kunlaboro estis multthoma kaj internacia. Per tiu decido ankaŭ la Estraro de UEA plenumas devon de la Asocio, kiu en la pasinta jardeko deklaris la okazigon de UK en Afriko kiel strategian elementon por UEA.

La Asocio nun kunlaboros kun la lokaj aktivuloj por fikisi la datojn, lokan kongresan komitaton, temon kaj aliajn detalojn de la 109-a UK. La kongresejo estos la Aruŝa Internacia Kunveneja Centro, altnivela loko por internaciaj

eventoj, kiu jam gastigis eventojn de UN. La Kongresa Fako kaj la Estraro de UEA ankaŭ kunlaboros kun ĉiuj partioj koncernataj de la okazigo de la UK, ĉu de la Esperanto-movado, ĉu de lokaj instancoj en Tanzanio. Jam eblas subteni la 109-an UK-on per donaco al la Fondaĵo Afriko de UEA: uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

Pamětníci, podělte se o své materiály a vzpomínky

Mnozí z nás mají ve své paměti nejen vzpomínky na svou vlastní esperantskou činnost, ale i na významné esperantisty, kteří už nejsou mezi námi. Pokud včas nepořídíme zápis a neuložíme ve svazovém archívu, mohou být tyto informace nenávratně ztraceny. Také fotografie z různých akcí, klubových či svazových, které dokumentují historii našeho hnutí, se ztrácejí, pokud nejsou včas uloženy. Fyzicky je možné uložit je v našem muzeu ve Svitavách, nebo elektronicky (skeny) ve svazovém počítači NAS, kam může tyto materiály ukládat redaktor Starta (starto@esperanto.cz). Několik esperantistů se dostalo i do celostátního projektu:

Paměť národa

[Jiří Laube](#)

[Max Kašparů](#)

[Jan Mečír](#)

[Vlastimil Novobilský](#)

[Pavel Polnický](#)

[Miloslav Šváček](#)

KONTRIBUU AL LA KONGRESA TEMO EN UK TORINO

ENMIGRADO – KUNFLUO DE HOMAJ VALOROJ

En ĉiuj epokoj de la historio homoj migris de unu regiono al alia, de unu lando al alia – ĉu por trovi lokon por kultivi teron kaj nutri sian familion, ĉu – en la nuntempo – por studi aŭ labori. Homoj kun diversaj kulturaj fonoj, kun diversaj gepatraj lingvoj kunvivas en sama loko, tiel homaj valoroj kunfluas kaj kontribuas al la pluevoluigo de socioj. Migrado estas inspiro, ne nur por la homoj, kiuj migras, sed ankaŭ por tiuj, kiuj renkontas la migranton kiel novan najbaron.

Multaj esperantistoj riĉigis siajn vivojn per propra migrada sperto. Jam la eklerno de la internacia lingvo Esperanto estas unua paŝo por esti preta renkonti homojn kun alia gepatra lingvo, alia kultura fono. Kelkaj esperantistoj elektis vivi en aliaj landoj kaj mem fariĝi parto de la socio kaj kulturo de la nova lando.

Samtempe, pli kaj pli ofte homoj estas devigataj forlasi sian hejmon. Ili fariĝas migrantoj kontraŭvole – pro milito, pro mizero, pro danĝero. Ili ne povas resti en siaj hejmlokoj, sed devas fuĝi. En la jaro 2022 la nombro de rifuĝintoj tutmonde unuafoje superas cent milionojn, laŭ la statistiko de la UN-suborganizo por rifuĝintoj, UNHCR.

Tiujn temojn ni diskutos dum la 108-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Torino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto 2023. La urbo Torino estas taŭga gastiganto por tiu Kongresa temo – en Torinon enmigris miloj da homoj por labori en la industriaj produktoj. Ni lernos pri la

situacio de enmigrantoj en Torino kaj en Italio en la pasinteco kaj en la nuntempo. Ni studos la fenomenon de migrado en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: Migrado ĉiam estis fonto de evoluo kaj progreso: migrado de plantoj, de bestoj, de homoj. Kaj fine, ni intencas analizi, kiun rolon ludu la Esperantomovado por solvi problemojn estiĝantajn pro migrado aŭ por migrantoj.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn lertajn aŭ spertajn pri la temo “migrado” kontribui al la programo. Eble vi mem migris al alia lando kaj pretas raporti pri viaj spertoj. Aŭ vi subtenas migrantojn kiuj venis al via mondoparto kaj vi pretas dividi tiujn viajn spertojn kun la kongresanoj. Reĝisoro de la Kongresa temo estas Thomas Bormann, ĵurnalisto el Germanio, esperantisto de post la 70-aj jaroj. Bormann vivis dum pluraj jaroj en Turkio kaj en Grekio por raporti el tiuj landoj por germana radio-reto “ARD”. Ofta temo por li estis la situacio de la multaj rifuĝantoj kiuj trapasis aŭ restis en Turkio respektive Grekio. Por kontakti la reĝisoron pri la kongresa temo, skribu al

KongresaTemo@groups.io

Interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni la [diskutliston](#).

Ĉiuj estas invitataj aliĝi al la 108-a UK per reta aliĝo: uk.esperanto.net/2023 antaŭ fino de la dua aliĝperiodo je la 31-a de marto 2023.

GK UEA 092

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE HOMAJ RAJTOJ, 10 DECEMBRO 2022

[Mesaĝo sendita al UN. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon!] Venontan jaron, la 10-an de decembro 2023, la mondo festos la 75-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Estas antaŭvidata tutjara kampanjo de Unuiĝintaj Nacioj inter nun kaj tiam, sub la ŝildo “Digno, Libereco kaj Justeco por Ĉiuj!”

Sed jam en la jaro 2022 la Esperantomovado festas propran 75-jaran homrajtan jubileon: nia organizo, la Universala Esperanto-Asocio, kunveninta, unuafoje post la fino de la Dua Mondmilito, en Berno, Svislando, en 1947, deklaris, ke “la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo.” Tiel ĝi anticipis la ekvalidiĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj en 1948 per pli ol unu jaro; kaj tiel, de tiam ĝis hodiaŭ, ĝi subtenas la agadon de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por homaj rajtoj ĝenerale kaj lingvaj rajtoj tute aparte.


La sinteno de UEA koncerne homajn rajtojn, laŭ la rezolucio de 1947, “estas diktata de la ideaj celoj de la Esperantomovado.” La movado por Esperanto ja rilatas al disvastigo de facile akirebla internacia lingvo por ĉies uzo, sed la idealo malantaŭ tiu movado estas eĉ pli vasta: pacigo kaj kunlaborigo de la homoj je tutmonda skalo.

En la rezolucio de 1947, Universala Esperanto-Asocio deklaris, ke ĝi “rilatas simpatie al ĉiuj movadoj, kiuj sur

nepolitika bazo klopodas efektiviĝi ideojn identajn tute aŭ parte kun la celoj de la Asocio.” Mallonge dirite: UEA laboras kun ĉiuj organizoj kiuj celas antaŭenigi la supremenciitajn “dignon, liberecon kaj justecon por ĉiuj.” Ni invitas ĉiujn tiajn organizojn al kunlaboro por la komuna bono.

Festante la 75-an jubileon de sia formala rekono de la homaj rajtoj, la Asocio alvokas al ĉiuj homoj kaj organizoj de bona volo, ke ili kunlaboru por la realigo de la bazaj homaj rajtoj kaj por ilia plilarĝigo por la prospero kaj daŭripovo de nia planedo.

Pensoj pri la Esenco de Tetjana Lohvinovska



En la jarkunveno de KE Brno (1.3.2023) O. A. Fischer prezentis sian tradukon de mallongaj eseoj de ukraina aŭtorino, kiu en Kijevo zorgas pri siaj gepatroj, dum sur la urbon falas bomboj, kio pensigas ŝin pri la esencaj demandoj de la vivo.

butiko@esperantobrn.cz

INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO

3-A ELDONO LANĈITA KUN NOVA TEMO KAJ NOVAJ LINGVOJ

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) revenas kun la temo *La sekreta vivo de miaj najbaroj*. La tria eldono de la konkurso estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj.

Krom la temo *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, du novaĵoj atendas la partoprenantojn en la ĉi-jara Interkultura Novelo-Konkurso: nun eblas konkursi per **ses lingvoj** kaj estas **dek mon-premioj** por gajni.

Krom Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina kiuj estis akceptitaj en la dua eldono, aldoniĝas ĉi-jare la kataluna kaj la persa. Tamen tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas.

Noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longeco. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas mencii en la sendof formularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 109-a Universala Kongreso de UEA en 2024. En la komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la

aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2023.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe: bobelarto.ink/konkurso.

Kadre de la dua eldono, kies temo estis *Nokta vojaĝo*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 421 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 39 landoj. La ĵurio aktuale laboras pri la juĝado de la selektitaj noveloj. La gajnintoj estos anoncitaj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 108-a UK, okazonta en Torino (29 julio-5 aŭgusto 2023). Por aliĝi al la kongreso, vizitu:

uea.org/kongresoj/alighilo.

Amo, tuso kaj forpaso, la novel-rikolto de la unua eldono de la konkurso estas aĉetebla en la [Libroservo de UEA](#) kaj ĉe [eldonejo KAVA-PECH](#).

KER-ekzamenoj

En junio kaj aŭgusto **denove okazos retaj KER-ekzamenoj** en ĉiuj niveloj:

- la 3-an de junio je nivelo C1;
- la 10-an de junio je nivelo B2;
- la 17-an de junio je nivelo B1;
- la 4-an de aŭgusto je nivelo C2.



• **Dum la kongreso en Torino** eblos ekzameniĝi en la [tradicia maniero](#), papere/ĉeeste.

• **Jam 2650 personoj el 81 landoj** trapasis KER-ekzamenojn. Ni fieras pri ili.



INSTRUISTA TREJNADO
en la kunlaboro de la Interlingvistikaj
Studoj de AMU, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando), ILEI kaj Edukado.net denove kune **organizas unujaran instruistan trejnadon**, kiu disponigos la necesajn konojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando (09-15.09.2023). La sekvaj sesioj okazos rete: du semajnfinaj renkontiĝoj en 2023, 4-taga sesio en februaro 2024 kun aldona ekzameno, kaj denove du semajnfinaj sesioj printempe de 2024. Inter la retaj sesioj la partoprenantoj laboros hejme pri la ricevitaj taskoj, uzante ankaŭ la retejon de Edukado.net kaj konsultiĝos kun la kursgvidantoj. Por fini la studojn necesos pretigi finlaboraĵon pri metodika temo, kies prezento kun la fina kompleksa (teoria kaj praktika) ekzameno okazos en septembro 2024. Aliĝantoj ricevos movadan diplomon pri instruista trejnado.

La trejnado estas specialiĝo de la 3-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj, kio signifas, ke temas pri la plej altnivela instruista trejnado, responde al la universitataj programpostuloj, kun teoria bazo kaj praktiko.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de Esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 150 EUR por unu semestro.

Informo kaj aliĝo: [interlin\(ĉe\)amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl) aŭ [ikoutny\(ĉe\)amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl).

Limdato: 15.08.2023.

El la Programo

Lingvopedagogio (Katalin Kováts, Ilona Koutny, Zsófia Kóródy):

- Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instruprocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)
- Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.)
- Instruhelpiloj (tradiciaj kaj modernaj)
- Taksado kaj ekzamenoj

Esperanta kulturo (Suso Moinhos, Ilona Koutny):

- Tiklaj punktoj de Esperanto-gramatiko
 - Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de Esperanto-literaturo
 - Plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto
-

Lingva trejnado

Donaco: partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj:

- Nuntempaj problemoj de e-movado (Mark Fettes)
 - Nuntempa Esperanta literaturo (Suso Moinhos)
-

Ilona Koutny, Katalin Kováts

MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO

Okaze de la Internacia Virina Tago 2023, Universala Esperanto-Asocio salutas virinojn ĉie en la mondo. Ni daŭrigos kaj intensigos nian laboron por virinaj rajtoj kaj por plibonigo de la situacio de virinoj kaj knabinoj tra la mondo, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj.

Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj. Ni devas antaŭenigi tiun egalecon ĉie. La ĉi-jara temo de la observo-tago -- Novigo kaj teknologio por genra egaleco -- atentigas pri efikoj de la "cifereca divido" sur ekonomiaj kaj sociaj malegalecoj. Virinoj kaj knabinoj povu sekure kaj libere aliri ciferecajn spacojn por plena disvolviĝo kaj socia partoprenado. Perforto per Interreto ja estas perforto, kaj netolerebla.

La Internacia Lingvo, per sia tutmonda reto de Esperanto-parolantoj, donas okazon por vere internacia komunikado kaj komparado pri la situacio de virinoj ĉie en la mondo. Ni aparte estimas tiujn kiuj uzas Esperanton kiel voĉon de tutmonda civila socio.

Krome, por plena inkluzivigo de virinoj, necesas lingva justeco, tiel ke virinoj:

- **egale partoprenu en socio**
- **rolu en gvidaj pozicioj en ĉiuj sferoj kaj medioj**
- **ĝuu socian sekurecon, decan laboron kaj ekonomian liberecon**
- **havu plenan kaj egalecan aliron al edukado**
- **estu liberaj el ĉiu perforto, kaj**
- **povu helpi en la kreado de pli bona mondo por ĉiuj.**

Laŭ GK UEA n-ro 1096

EL LA VIVO DE NIAJ KLUBOJ

Brno: La 9-an de decembro 2022 prelegis pri Esperanto Milan Kolka en la Universitato de la Tria Aĝo ĉe Masaryk-universitato.



La 17-an de januaro 2023 Josef Vojáček prezentis en Mahen-biblioteko temon *Jazyky a komunikace* (Lingvoj kaj komunikado).



Prostějov: La 2an de februaro 2023 okazis la kluba jarkunveno.



Svitavy: La 11-n de februaro 2023 en Esperanto-muzeo la klubo havis sian jarkunvenon. La klubo akiris novan membrinon Dr. Dynková, preparos ekspozicion „90 jaroj de Esperanto en Svitavy“ (inaŭguro la 2-an de septembro 2023), entreprenos 4-tagan ekskurson al Uherské Hradiště, propagandos Esperanton inter junularo kaj okazigos tri senpagajn kursojn. Pasintjare la klubo kontribuis al aŭdio-libro de Lubomír Tomík el Uherské Hradiště, kunlaboris kun Aŭtomotoklubo dum Bierfesto, preparis du aranĝojn por infanoj kaj ekspoziciojn pri kongresoj kaj 150-jara naskiĝjaro de F.V. Lorenc.



Šumperk: Decembran Zamenhof-tagon festis klubanoj kiel tagon de Esperanto-literaturo kun legado de poemoj.



Mladá Boleslav: Boleslava rondeto kunvenas regule ĉiuj merkredoj de 10-a horo en Centro de volontuloj sur ĉefa strato de Václav Klement 601 / 13 kaj invitataj estas esperantistoj kaj ne-esperantistoj.



En februaro okazis du aranĝoj por publiko.

Je la 15-a de februaro ni kunvenis por prezento de komuna laboro pri tradukado de fabeloj el tuta mondo. La anoj legis dekon de mallongaj rakontojn el libretoj, kiuj eldonis libre J. Drahotová. La fabelojn vi povas aŭskulti en aŭdilibro, kiun deklamas infanoj en Havířov - vi povas senpage akiri la aŭdiolibron sur adreso:

www.youtube.com/watch?=wsU8WvFDAVY
senpage

Je la 22-a de februaro okazis prelego de nia amiko Jiří Blažek el Brandýs nad Labem, kiu jam rakontis en Klementinka pri siaj vojaĝoj en Japanio kaj Koreio. Nun li rakontis pri vojaĝo al Armenio kaj Kartvelio je la pasinta jaro.

Partoprenu ankaŭ vi, venonte! Informu ĉe: Jindřiška Drahotová, telefono 720652320, drahotova@esperanto.cz

Esperanto-klubo Prostějov

serĉas numeron 1509 (1971) de **Heroldo de Esperanto** por povi bindi kompletan jarkolekton. Bonvolu proponi al:

Jaroslav Liška
dundeejarek@seznam.cz

Ebroviny pri KAVA-PECH

La reta literatura periodaĵo Ebroviny (monata gazeto de Vratislav Ebr) en sia januara numero 2023 intervjuis Petron Chrdle okaze de la 30-jariĝo de lia eldonejo KAVA-PECH. Sur p. 11 li priskribas sian agadon.

La gazeto estas dissendata senpage al ĉiu, sufiĉas mendi ĉe zpravodaj@ebroviny.cz.

Pri Vikipedio en televido

La Ĉeĥa Televido en kanalo ČT24 elsendis sabate la 18-an kaj denove 25-an de februaro 2023 programon *Historie.cz*, dediĉitan al ĉeĥa Vikipedio. Post 19 minutoj de diskutado oni elsendis mallongan intervjuon kun Miroslav Malovec, faritan en 2011 dum Vikimania en Svitavy, pri fondo de la ĉeĥa Vikipedio per traduko ne el la angla, sed el Esperanto. La programo estas [spektebla](#) en la retejo. Oni diskutis precipe pri la estonteco de Vikipedio.

Prezidenta terminologio en Esperanto

La klubanoj de EK Praha diskutis pri la prezidento de la respubliko kaj pri la rilatanta Esperanta terminologio. La diskuto estis [registrata](#) kaj metita en Jutubon.

Internacia belarta konkurso por infanoj

Ĉi-jara temo estas **Kio okazas en la pejzaĝo** kaj la fermo estos la 5-an de majo. Ĉe la adreso <https://www.zsfrydecka.eu/31-rocnik>

vi trovos detalajn informojn, kiujn vi povos proponi en proksima lernejo. Ĉiujare estas premiitaj 20 infanoj kaj 1 instruisto el 10-15 landoj. La aranĝo estas neesperantista, sed esperantistoj helpas kun propagando.

Jiřina Sivá
lernejestrino
ZŠ a MŠ Havířov-Bludovice Frýdecká

Novajoj el Slovakio

Esperantisto Slovaka ne plu aperas, tamen fine de la jaro 2022 aperis eksterordinara numero en formo de **Jarlibro 2022**, senpage [elŝutebla](#) en PDF-formo.



En la numero vi trovos artikolojn pri Poludnica, kluba agado, pri aktivecoj de E@I kaj eldonejo ESPERO, pri du novaj vortaroj, pri nova maniero organizi UK-ojn, pri gravuloj de slovaka E-movado.

Elŝuteblas ankaŭ [JarKompaso](#) 2023, per kiu vi povas sumigi la pasintan jaron kaj plani la alvenantan. En Jutubo vi povas spekti slovaklingvan klarigon de esperantistino kaj poligloto Lúdia Machová pri la avantaĝoj de tia jarkompaso.

La teamo E@I translokiĝis de Partizánské al Nová Dubnica, 12 km de la Moravia landlimo. Tie oni rekonstruas proprajn konstruaĵojn, en kiuj la teamo disvolvos sian agadon. La 16-an de decembro 2022 okazis Zamenhof-festo, kiu estis fakte inaŭguro de la nova Esperanto-centro en Slovakio.



La eldonejo ESPERO verŝajne finos sian agadon en 2023, ĉar esperantistoj ne emas aĉeti kaj legi librojn.



Tamen jam estis eldonita sub gvido de ESPERO unu el la plej gravaj esperantlingvaj literaturaĵoj, nome kompleta verkaro de Marjorie Boulton en du volumoj kun 1212 paĝoj kaj sub titolo **Unu animo homa**.

Preparataj estas ankoraŭ prelegaro **KAEST 2020**, sciencfikcia **Kuprokranio** (daŭrigo de la libro *La tago de kiborgiĝo*) kaj fabellibro **Pri la eta talpo, kiu volis scii, kiu faris tion sur lia kapo** esperantigita de Istvan Ertl.

Sadako en Esperanto

Kiel jam estis anoncite, la eldonejo KAVA-PECH preparis la eldonon de la Esperanto-versio de la mondfama verko de Karl Bruckner *Sadako volas vivi!* en la traduko de Jan Duda.

Bedaŭrinde ĝi ne povis aperi ĝis nun pro problemoj rilate al akiro de kopirajto. Tiun obstaklon ni sukcesis venki kaj ĵus mi subskribis la licenc-kontrakton kun la aŭstra eldonejo, kiu posedas kopirajton post la forpasinta aŭtoro. Do jam nenio malhelpas al reala eldono de la libro.



Temas pri japana knabino Sadako, kiu kiel kvarjara travivis la 6-an de aŭgusto 1945 la atakon kontraŭ Hiroŝimo per atombombo sen videbla vundiĝo. Kiel 13-jara, do 9 jarojn post la atomatako, ŝi subite svenis, kaj la kuracistoj indikis ĉe ŝi leŭkemion, la malsanon kaŭzitan de radiado. La vera okazaĵo, romanstile prilaborita, inter alie klarigas la komencon de la historio de papergruoj.

Sur la kovrilo estas bildigita la statuo de malgranda Sadako tenanta enmane oran grupon, kiu troviĝas en la Parko de Paco en Hiroŝimo. Tiu statuo fariĝis simbolo de sekvoj de uzado de atomarmiloj. Ĉiujare oni sendas al la monumento multajn papergruojn.

Temas pri plia eldonaĵo en la vico de kontraŭmilitaj libroj eldonataj de KAVA-PECH. Al ili ankaŭ viciĝas la plej freŝe eldonita *Bluaj neĝoj* de Piotr Bednarski en la traduko de Ewa Bodnarska.

Pri ĝi almenaŭ koncize: La aŭtoro el miksita familio de pola oficiro kaj juda patrino estis deportita kun la gepatroj al Siberia gulago, tuj post kiam Sovetio okupis orientan Pollandon en la jaro 1939. En la libro li priskribas la kondiĉojn kaj proprajn travivaĵojn tie.

Petro Chrdle

Seminario „Eŭropaj fervojoj“

6.3.2023 Universitato Pardubice – Fakultato de Transporta Inĝenierio (*Dopravní fakulta Jana Pernera*) kunlabore kun Ĉeĥa Fervoja Esperanto-Asocio preparis en urbo Pardubice (Ĉeĥio) seminarion „Eŭropaj fervojoj“, kies temo estis „Daŭripova fervojtransporto“. La unua preleganto Rodica Todor prezentis Verden-projekton, poste Lars Sözüer prelegis pri fervojo kaj biciklado. Sekvis prelego de Vito Tornillo pri Intermodala transporto en Italio kaj najbaraj landoj. Post paŭzo ni havis eblecon aŭskulti prelegon „Ĉeĥa Fervojadministracio *Správa železnic, s.o.* kaj strategio de daŭripova evoluo“ de Roman Štěrba. Lasta prelego de Francesco Maurelli estis dediĉita al rilatoj inter robotiko kaj daŭripoveco.

Surloke partoprenis 36 aŭskultantoj, multaj per interreto (el Pollando, Slovakio, Hungario, Romanio, Kroatio, Italio, Germanio, Danio, Francio kaj Belgio).

Post prelegoj okazis faka ekskurso al universitata trafiksalono, kie partoprenantoj povis provi regadi itineron de trajnoj.

Ladislav Hakl

ASOCIA KRONIKO


JUBILEANTOJ DE JANUARO,
FEBRUARO KAJ MARTO 2023

Kiril Angelov, Pardubice
Jaroslav Beneš, Třebíč
Stanislav Čech, Dubňany
Milada Filová, Hranice
Jaroslava Hladíková, Dašice
Ing. Lumír Holan, Ostrava
Pavčina Hučínová, Olomouc
Vlasta Chalabalová, Plzeň
Antonín Juřica, Vlašská Polanka
Alois Klumpar, Česká Třebová
Alžběta Matějčíková, Rokytnice u Přerova
Georgi Milev, Karlovy Vary
Petr Pejchl, Karviná
Ing. Ivonna Picková, Čelákovice
Jaroslav Bergl, Brno
Ing. Miroslav Šýkora, Svitavy
Mgr. Radmila Švejcarová, Praha

Josef Pokorný fariĝis 103-jara la 1-an de februaro 2023

Al la jubileantoj ni deziras firman sanon,
kontenton kaj ĝojon en iliaj pluaj jaroj!

Květuše Kafková (1923-2023)



La 10-an de marto 2023 forpasis sinjorino Květuše Kafková, honora membrino de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio, kiu en aŭgusto atingus 100-jariĝon. Ŝi multe vojaĝis kaj dediĉis sin ankaŭ al pentrado.

JUDr. Jiří Šmidák (1931-2022)

Longjara aktiva membro de E-Klubo en Písek, ĉiam amikema, ridetema, vigla kaj kun granda skalo da interesoj, forpasis la 4-an de decembro 2022.



Zdeněk Závodný 1929 - 2023



La 27-an de februaro 2023 forpasis en azila domo en Havířov s-ro Zdeněk Závodný, kiu ankoraŭ antaŭ unu jaro vivis en Brno. Li estis soldato (subkolonelo), vizitis Nordan Koreujon, Egiption, Libion, kiel fremdulgvidanto li ĉiĉeronis ankaŭ en Vieno, sciis angle, germane, itale, ruse, en la kluba arkivo de KE Brno estas elŝuteblaj pluraj liaj prelegoj.

Festo en Poděbrady

La 4-an de marto 2023 en Tago de Poděbrady la banurbo honoris jam tradicie siajn civitanojn por ilia laboro. Inter la honoritoj estis ankaŭ **Pavel Polnický** pro sia multjara agado en ĈEA, klubo de turistoj kaj en la evangelia eklezio. La feston gvidis Jolana Voldánová, la medalojn transdonis la urbestro.



Foto Z. Formánková

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradíte na účet u **Raiffeisenbank**, č. ú. **101 953 9617/5500**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1450,- Kč (*970,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://seznoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
54. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Mgr. Andrea Švubová,
svubova@esperanto.cz

Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2023

-

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 54-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2023

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan merkredon virtualaj kunvenoj de
E-Klubo en Brno - gastoj bonvenas!

Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>

info: brno@esperanto.cz

2023

2023-07-08/16 Somera Esperanto-Studado en
Trenčín

Info: ses@ikso.net

2023-07-16/29 Unua etapo de Lančov

2023-07-30/08-11 Dua etapo de Lančov

2023-08-11 Renkonto de eksaj tendaranoj

info: let.lancov@seznam.cz

2023-07-29/08-05 La 108-a Universala
Kongreso en Torino

Info: <http://uk.esperanto.net/2023>

2023-08-5/12 Kristana kongreso en Bialystok

info: polnickypavel@seznam.cz

2023-09-29/10-01 ĈEA-konferenco en Suda
Moravio, nome en Prudká apud Tišnov

Info: komitato@esperanto.cz



BESTĜARDENO (Prago, 26.2.2023)



Libroservo dum la festo al Odoriko



Seminario „Eŭropaj fervojoj“ kiel parto de Verden-projekto en la universitato de Pardubice



La centjara franciskano rakontas



Ripozejo Prudká

La ĉefa konstruaĵo kun ĉambroj kaj manĝejo




Foto Pavla Zemanová

Pri la nova libro kun la ilustraĵoj de Mirka Tomečková interesiĝas ne nur homoj.



Prudká - manĝejo